

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 13.2.2013

Loko de lasta ripozo de Johano Ĵiĵka

Oldřich Arnořt Fischer

Johano Ĵiĵka (ĉeĥe: *Jan Źiřka*), fama husana militestro, estas historia personeco, kiu estas ĉirkaŭita per multe da mitoj. Li naskiĝis en vilaĝo *Trocnov* en suda Bohemio. Ni ne scias kiam. Lia patro nomiĝis Gregoro (*Řehoř*) de *Trocnov*. Johano estis en sia infaneco vundita per glavo kaj perdis sian maldekstran okulon. Li havis fratinon nomatan Agnes (*Aneřka*), fraton *Jaroslav-on*, edzinon nomatan Katarina (*Kateřina*), filinon kaj bofilon. Kvankam li estis nobelo, li malriĉiĝis kaj ekvivis inter sudbohemiaj rabistoj. En grupo de rabiestro Mateo (*Matěj*) li gajnis unuajn spertojn pri gerila batalo. Lia instruisto Mateo kaj multe da liaj amikoj, rabistoj, estis pli poste kaptitaj, streĉe turmentitaj kaj ekzekutitaj, sed Ĵiĵka iam helpis al bohemia reĝo Venceslao IV kaj la reĝo ne forgesis tion. Li amnestiis Ĵiĵkon, kiel „sian fidelan kaj ŝatatan“ amikon, en la jaro 1409. Kial? Neniu tion scias.

En la jaro 1414 Ĵiĵka aĉetis domon en Prago. Tiun domon li en la jaro 1416 vendis kaj aĉetis pli magrandan domon. Li eksciis doktrinon de Majstro Johano *Hus*, fariĝis husano kaj subtenis husanan programon „Kvar pragaj artikoloj“. La unua punkto de tiu programo postulis liberan predikadon de la Vorto de la Dio. La dua artikolo postulis utrakvismon. Tio signifis, ke dum la sankta meso ne nur pastro, sed ĉiuj ĉeestantoj prenis korpon kaj sangon de la Dio. Tial simbolo de husana movado estis pokalo kun la Dia sango, kiun antaŭe prenis nur pastroj. La tria artikolo postulis rekvizicion de eklezia posedaĵo. Kaj la kvara artikolo postulis egalecon de pekantoj. Tio signifis, ke nobelo devas esti punita tiel juste kiel malriĉulo. Ĵiĵka, kiu en la jaro 1419 fariĝis unu de gvidantoj de husana movado, batalis por tiuj kvar artikoloj. Lia unua fama batalo, kie li venkis fortosuperecon de bohemiajn kruckavalirojn, estis batalo apud *Sudoměř*. En la jaro 1420 li venkis hungaran reĝon Sigismondon Luksemburgan, gvidanton de la unua krucvoja militiro kontraŭ husanoj, kaj savis Pragon. Li uzadis defensivan taktikon, barilon konstruitan de militĉaroj kaj artilerion. Kontraŭ kruckavaliroj en armaĵoj li staris armeon de eksaj kamparanoj. Kiam husanoj fondis urbon *Tábor*, Ĵiĵka estis unu de kvar estroj, kiuj regis super husana komunumo de tiu urbo. Post iu konflikto kun aliaj husanoj li fondis centron nomatan Nova *Tábor* en orienta Bohemio. En la jaro 1421 li estis vundita apud kastelo *Rábí*. Lia kapo estis batita per iu malakra objekto. Lia dekstra okulo estis operita en Prago. La operacio de okulo en la 15-a jarcento, kiam ne ekzistis antibiotikoj kaj unusola anestezo estis alkoholo, kiu estis prezentita en ega dozo, estis tre riska kaj vidsenton de Ĵiĵka ne savis. Vivo en husanaj milittendaroj estis malfacila. Spite de tio blindulo Ĵiĵka denove aperis en batalkampo

kaj en la jaro 1422 li venkis kruckavalirojn de la dua krucvoja militiro, kiujn sendis kontraŭ husanoj roma papo! Ĵijka ne batalis nur kontraŭ eksteraj malamikoj de husanoj, sed ankaŭ kontraŭ samlandanoj, kiuj ne respektis la artikolojn. La 4-an de aŭgusto 1423 husanoj subgvide Ĵijka venkis praganojn en batalo apud *Hradec Králové*. Ĵijka persone mortigis per sia madzo pragan pastron, kiu portis monstrancon! Tio atestas ne nur pri krueleco de Ĵijka, kiu mortigis nearmitan homon, eĉ pastron, sed ankaŭ pri tio, ke Ĵijka ne estis tute blinda! Li povis distingi almenaŭ silueton de malamiko kaj bone sciis, kien bati per sia madzo.

Vere, Ĵijka ne estis anĝelo, sed li postulis disciplinon de husanaj batalantoj. En sia verkaĵo „Armea Regularo“ („*Vojenský řád*“, 1423) li detale priskribis organizadon de husana armeo kaj ankaŭ moralajn postulojn: ni ne estas rabistoj, sed batalantoj de la Dio. Ne rabu! Ĵijka kruele punis husanojn, kiuj ne observis disciplinon kaj rabis dum bataloj. La 7-an de junio 1424 bofilo de Ĵijka falis en batalo apud Malešov. En tio jaro ankaŭ Albreĥto de Aŭstrio, bofilo de imperiestro Sigismondo, atakis Moravion. Husana armeo subgvide Ĵijka volis venki Albreĥton. Dum vojo Ĵijka volis konkeri bohemian urbon *Přibyslav*. En milittendaro apud *Přibyslav* li forpasis en eternon la 11-an de oktobro 1424.

Kio kaŭzis morton de Ĵijka?

En historiaj dokumentoj oni parolas pri „pestaj abscesoj“ kaj „pesta absceso“. Unufoje en pluralo, dufoje en singularo. Sed en la jaro 1424, kiam Ĵijka mortis, neniu pesto estis en Bohemio. Krom tio la pesto estas tre kontaĝa malsano kaj neniu alia homo en husana milittendaro apud *Přibyslav* mortis. En tendo, kie Ĵijka mortis, ĉeestis husanaj elstaruloj netimante de la malsano.

Venenado? En la milittendaro ĉiuj manĝis komune kaj neniu krome Ĵijka mortis. Oni ne trovis arsenon en korpaj restaĵoj de Ĵijka.

Fama ĉeĥa profesoro *Josef Thomayer* (1853 - 1923) eksplikis laŭ simptomoj, kiuj estis priskribitaj en dokumentoj, kaŭzon de la morto. Ĵijka estis maljuna homo inter 60-65 jaroj. Li povis suferi per furunkloj. Tio estas malgrandaj subhaŭtaj inflamoj. Se la furunkloj („pestaj abscesoj“) ne estas kuracitaj, ili povas malgrandiĝi, fariĝi karbunkloj. Laŭ profesoro *Thomayer* Ĵijka mortis per granda karbunklo („pesta absceso“), nekuracita ĥronika inflamo, kiun imuna sistemo de maljunulo jam ne kapablis primajstrigi.

Post morto estis korpaj restaĵoj de Ĵijka transportitaj en orientbohemian urbon *Hradec Králové* kaj la 10-a tago post morto enkriptigitaj en Katedralo de la Sankta Spirito. Ĵijka restis en la Katedralo en *Hradec Králové* almenaŭ ĝis la jaro 1460. Tiam reĝis super Bohemio reĝo Georgo de *Poděbrady* (*Jiří z Poděbrad*) ekde la jaro 1458. Dank'al bona politiko de tiu tolerema reĝo ekzistis en nia lando du religioj: katolika kaj utrakvista religioj. Dum la jaroj 1460 – 1463 la Katedralo de la Sankta Spirito en *Hradec Králové* estis riparita, ĉar la reĝo volis fariĝi la urbon unu de signifaj centroj de sia regno. Kaj tiam korpaj restaĵoj de Ĵijka povis esti transportitaj en alia loko, en bohemia urbo *Čáslav*. Kronikoj pri tio silentas. Ĵijka estis fama personeco, kies nova enkriptigado povus esti dokumentita, sed neniu noto pri tio estas konata. Eble Georgo de *Poděbrady* ne volis revivigi memorojn pri husana movado, eble li ne volis havi en renovita *Hradec Králové* kriptigitan husanan militestron. Neniu tion scias.

Čáslav estis dum husanaj militoj (1420 - 1434) husana urbo. Tie estas preĝejo de la Sanktaj Petro kaj Paŭlo. Urbanoj de *Čáslav* havis neoficialan version, ke Ĵijka estis transportita en *Čáslav*-on jam post sia morto kaj enkriptigita tie. Laŭ tiu versio estis en fermita

kaj neniam plu malfermita ĉerko sendita en *Hradec Králové*-n anstataŭ en la jaro 1409 Ĵiĵka iu mortigita germano. Sed neniu sciis, kie en la preĝejo Ĵiĵka estis enkriptigita.

En la 19-a jarcento oni sensukcese serĉis korpajn restaĵojn de Ĵiĵka en la jaroj 1865 kaj 1875. En la jaro 1880 urbanoj de *Čáslav* dediĉis al Johano Ĵiĵka monumenton, kies aŭtoro estis *Josef Václav Myslbek*, tiu fama skulptisto, kiu kreis statuaron de Sankta Venceslao en Prago. La 14-an de junio 1901 urba konsilio konsentis kun nova serĉado en la preĝejo. En la jaro 1903 estis fondita Unuiĝo por Riparado de la Preĝejo de la Sanktaj Petro kaj Paŭlo. Sed vera serĉado komenciĝis nur en la jaro 1908. La 21-an de novembro 1910 estis en muro de preĝejo trovita krenelo (115 × 80 × 80 cm). En la krenelo estis pelvpeco, kranio, ulno, femurosto, ripoj, du ŝindaj lignotabuletoj, peco de makzelo kun dentoj kaj peco de iu tolo. Laŭ ekspertizo de la jaro 1966 la ostoj trovitaj el la krenelo devenis de almenaŭ tri homoj.

La kranio apartenis al viro, kies maldekstra okulo estis vundita. Hungara profesoro *Imre A. Lengyel* faris serologan esploron en Budapeŝto en januaro 1981. Laŭ liaj rezultoj la kranio, ripo kaj la femurosto apartenis al viro, kiu havis sangogrupon A kaj mortis en la aĝo 61 – 65 jaroj. Korpo de homo havas pli ol 230 da ostoj. Neniu scias, kie aliaj partoj de skeleto de Ĵiĵka troviĝas. Sed estas probableco, ke animo de Johano Ĵiĵka de *Trocnov*, tiu fidela batalanto por la Leĝo de la Dio, povas nun esti en la ĉielo.

Literaturo

- CINK, J. (2013): *Česko-esperantská frazeologie/Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro*, 1-a eld., WERNER, J. (editoro), Brno, SILE, MSD, s.r.o., 325 paĝoj.
- FILIP, J. & FILIP, K. (1949): *Velký slovník česko-esperantský/Granda vortaro ĉeĥa-esperanta*. 1-a volumo, Prago, Slovaka Esperantista Asocio, Centro INLEC, 352 paĝoj.
- FISCHER, O.A. (2011): *Husanaj militoj kaj bohemia reĝo Georgo de Poděbrady*. Prelego por la Esperantista Klubo en Brno, retadreso: <http://www.medy.cz/brno-esperanto/husanaj-militoj.html> .
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): *Toulky českou minulostí*. 2-a volumo, 2-a eldono, Prago, Baronet, 454 paĝoj.
- IVANOV, M. (1982): *Kdy umírá vojevůdce aneb Záznam o zkoumání života i smrti Jana Žižky, kdysi čeledína krále Václava, poté horlitele pro zákon Kristův obzvláštní*. 1-a eld., Prago, Panorama, 412 paĝoj.
- KRAFT, K. (1998): *Česko-esperantský slovník/Vortaro ĉeĥa-esperanta*, 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 495 paĝoj.